

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ lokakuu ♦ oktobro ♦ 5/2009



*Riitta, Matti kaj Kerttu provas la varmegan (65–75°) akvon de minerala fonto.  
Raportoj pri la blindula kongreso en Pollando sur p. 8-11.*

**István Mórocz en finna gazetaro, p. 20**

Zamenhof-festoj, p. 4 ♦ Atilio pri Valamo de Ladogo, p. 16

Esperanto en Afriko, p. 12 ♦ Etsuo Miyoshi, p. 17

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnot: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatku 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 7793 487 ✉ esperanto@phnet.fi

*Taneli Huuskonen*, Liisankatu 5 B 44, 00170 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

*Paula Niinikorpi*, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Arvo Karvinen*, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 ✉ arvo.karvinen@elisanet.fi

*Jukka Laaksonen*, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

*Vilorg Teräväinen*, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>





## Esperanto sub Polusstelo

Polusstelo protektas navigantojn en la nordaj maroj. La unua nomo de nia ĉefurba esperanto-klubo estis Polusstelo. La poemo "Koto-maamme" de J.F. Granlund (Pori 1809 – Turku 1874)

unufoje presita en 1863 estas konata laŭ la komencaj vortoj "ĉi tie sub Polusstelo". La kortuŝa preĝeca poemeto estas de ĉiu finno konata kiel kanto en melodio de Ilmari Hannikainen (1892–1955).

Tiun verseron alprenis Väinö Linna (1920–1992) kiel titolon de sia trilogia romanego aperinta en 1959–1962. La verko de Linna estas ĝis nun nesuperita priskribo de la torento de popola historio Finnlanda de la 1880-aj ĝis postmilitaj 1940-aj jaroj. Ne aperis esperantaj tradukoj el Linna – sed certe troviĝas almenaŭ fragmentoj en tirkestoj de finnaj samideanoj. Kiuj eventualaĵe faris, ne hezitu konigi.

La Finnlanda Radio plenumis kulturagon produktinte radiodramon en 21 partoj el la romano. Komencita la 9-an de aŭgusto, ĉiu parto estas disaŭdigata en kanalo Yle1 dimanĉe je 15h00, lunde je 19h03 kaj marde je 11h00. Rete la dramo aŭskultblas ĉe [www.yle.fi/taallapohjantahdenalla](http://www.yle.fi/taallapohjantahdenalla) dum 30 tagoj post radia disaŭdigo. Indas instigi al aŭskultado, ankaŭ tiujn el niaj eksterlandaj amikoj, kiuj komprenas la finnan.

La epoko priskribita de la romano koincidas kun la frua kaj unua flora periodoj de esperanto. Ni rajtas supozi, ke pluraj, kvankam certe ne plejmultaj, personoj, rolantoj de la rakonto sciis pri esperanto. Plejmultaj finnoj, se ne ĉiuj, konas tiujn rolantojn; multaj el ni kvazaŭ siajn najbarojn, parencojn, familianojn. Ankaŭ ni trovas nin mem en literaturaj figuroj. Väinö Linna

ne mencias esperanton en la romano, ankaŭ ne en sia cetera verkaro, sed kia povus esti la rilato de liaj personoj al nia lingvo kaj ideo?

La popolaj intelektuloj de la romano estas tajloro Aadolf Halme, lia lernanto Valenti Lepänen kaj masonisto, poste advokato kaj parlamentano Janne Kivivuori. Estas pli ol verŝajne, ke Halme atentis gazetajn informojn pri artefarita lingvo proponata solvi internaciajn komunikajn problemojn kaj tiel progresigi pacon kaj interkomprenon. Same verŝajne estis, ke li aprobis tiajn celon kaj principon. Ĉu li trovis la aferon realisma? Se jes, povas esti ke li havigis al si lernilon; la unua esperanta lernolibro por finnoj aperis jam en 1902. El la ampleksa biblioteko de la memlerninta tajloro la verkisto mencias unu lingvolernolibron: Tiu estas pri la angla lingvo, kiun Valenti lernis elmigrante Usonon. Pri cetera lingvolernado ni scias, ke Janne Kivivuori instruiĝis pri la sveda. Kiam post la morto de la vidvino de Halme lia libro estas aŭkciita, Janne trastudas ĝin kaj trovas, ke li mem posedas ĉiujn valorajn el la titoloj poseditaj de Halme, kaj ne aĉetas la kolekton (ĝi restas ĉe Vihtori Kivioja, kiu aĉetas la tutan domon). Kredeble inter tiuj titoloj estas io pri esperanto; se jes, Halme certe almenaŭ konigis al si la gramatikon. Kredeble Janne, parlamentano en intermilita tempo, konis la junan Tyyne Leivo-Larsson (1902–1977), postmilitan parlamentanon, ministron kaj ambasadoron (la unua virino Finnlanda en tia ofico), aktivan anon de E-klubo de Helsinko. Sed ĉu la pliaĝa realisto Kivivuori akceptis la ideon de la juna fraŭlino Leivo?

Instruituloj en la romano estas la pastra familio (la protagonisto familio luas teron de la paroĥo) kaj la barono, posedanto de grandbieno. Ideologie, la unuemenciitaj apartenas al la nacia romantikismo, ili edukiĝis svede kaj fin-▷

nigis sin, dum la barono apartenas al la svedlingva altrangularo. Li estas malnovgeneracia praktikulo. La verkisto montras lian sintenon al idealismoj ekzemple, kiam Halme mencias Leonon Tolstoj: “Li stulta, donas sia tero, ne bona.” Estas dubinde, ke li entuziasmiĝus pri raportoj en svedlandaj gazetoj pri esperantoklubo en Uppsala. Parohestro Lauri Salpakari estas bonvolema humanisto, la edzino Ellen batalema, se ne fanatika finna nacionalisto. Iliajn lingvopolitikajn starpunktojn unuavice tio difi-

nas, sed ĉu estas spaco en ilia mondo al ideo de sendependa interlingvo. Certe ili estas informitaj. Universala Kongreso en Helsinko de 1922 estis granda evento en tiuepoka juna respubliko. Ni scias ankaŭ, ke pura neŭtralismo en la dudekaj ne funkciis kaj ankaŭ la Finnlanda Esperantujo ne estis idilio. Sinjorino Ellen Salpakari kaj fraŭlino Tyyne Leivo troviĝis malsamloke, eĉ se ambaŭ sciis esperanton.

Ili kaj ni vivas kaj vagas sub Polusstelo.

*Tuomo Grundström*

---

## Zamenhof-festoj en Finnlando

**Malfermaj pordoj en la oficejo en Helsinko 15.12.2007 je 15a-20a horo, adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, urboparto Hakaniemi**

Esperanto-oficejo en Helsinko malfermas pordojn al ĉiuj en la 150-a naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof, marde la 15-an de decembro, 2009 je 15a-20a horo. Estas la kutima deĵortago de la oficejo kaj ni plilongigas la deĵorhorojn de ambaŭ finoj. Ni esperas vidi tre multajn vizitantojn ankaŭ ekster la ĉefurba regiono. Pli detale pri la programoj de la tago ni informos per la retlisto EAF-agadas kaj en la retejo. Bonvolu disvastigi la informojn al tiuj kiuj ne havos eniron en la reto.

### Regionaj Zamenhof-festoj

Esperanto-Asocio de Finnlando esperas, ke la plej multo de siaj membroasocioj aranĝos kun-

venojn, festetojn kaj aliajn eventojn lige al la Zamenhof-tago en decembro. Estas ja la kutima tempo renkontiĝi en julaj festetoj antaŭ la granda kristnaska festo. Kun la tipaj finnaj kutimoj en la festeto, bonvolu kunligi ankaŭ ion pri la granda sinjoro el Bjalistoko. Sciigu al geamikoj en la tuta Finnlando pri via aranĝo rete aŭ alimaniere.

*Bonvenon al la oficejo en Helsinko 15.12.  
Estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando*

---

## Eventokalendaro de EAF

### 2009

15.12.2009 Malfermaj pordoj en la oficejo en Helsinko  
Decembre aranĝoj lige al Zamenhofa tago ĉe membroasocioj kaj aktivaj grupoj

### 2010

Vintraj Tagoj en februaro-marto  
27.6.–2.7.2010 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi  
17.–24.7.2010 Universala Kongreso de Esperanto, Havano, Kubo

### Laborkunsidoj

17.10.2009 Estraro


---

## Invito

Pro la 70-jariĝo de R. Pyhälä venu festeti en la Esperanto-oficejo en Helsinko la 24an de novembro 2009 je la 17a-19a horoj. Dolĉaĵoj, trinkaĵoj, babilado. Neniu donacoj, eventuale memoru EAFn.

*Saliko*

# Epämiellyttäviä totuuksia



Suomi on tutkitusti maailman vähiten korruptoituneita maita, Transparency International -järjestön tutkimuksissa olemme jatkuvasti olleet ainakin muutaman parhaan joukossa, usein aivan paras. Viime aikoina olemme kyllä saaneet huomata, että ei Suomenkaan poliittinen järjestelmä ole mitenkään immuuni arveluttaville käytännöille. Olisi ehkä liioittelua puhua korruptioskandaalista, mutta epäselviä rahavirtoja Suomessakin liikkuu talouselämän ja poliittisten päättäjien välillä tavalla, joka ei ole tarkoitus. Varsinaista korruptiota Suomessa voidaan edelleen pitää olemattomana verrattuna joihinkin maihin, joissa lahjukset eri suuruusluokissa ja eri tasoilla hallitsevat koko systeemiä.

Suomen medioita on jo puolitoista vuotta hallinnut erikoinen tapahtumaketju, jossa erilaisia arvailuja, huhuja ja tiedonsirpaleita on paikkailtu myöntämällä niitä tosiksi vain sitä mukaa, kun se on ollut pakko, ja toivottu, että loppu pysy salassa. Prosessi on mitä ilmeisimmin vielä kesken. Käsitys, joka minulle on kaiken tämän kuluessa vahvistunut, on, että paikkansa pitävien tietojen salailu julkisuudelta ei ole koskaan hyväksi. Tätä olen tämän lehden päätoimittajan ominaisuudessakin yrittänyt aina pitää ohjenuoranani. Se, että jokin tieto olisi julkisuuteen tullessaan epämiellyttävä, ei ole hyvä syy jättää sitä julkaisematta. Tieto voi olla mielenkiinnon tai hyödytön, ja siksi jäädä julkaisematta – tätä arviointia toki koko ajan teen yrittäessäni pitää tällä lehdellä hyvää tasoa – mutta epämiellyttävä tieto on parempi kuin epämiellyttävä tietämättömyys.

Totuus on asia, jolla on taipumus tulla josain vaiheessa ilmi. Siinäkin tapauksessa, että sitä joku onnistuu toistaiseksi salailemaan,

sitä yleensä alkavat heijastella erilaiset oikeansuuntaiset arvailut ja huhut. Mitä kauemmin epämiellyttäviä totuuksia ensin on salailtu, sitä ikävämpää niitten paljastuminen on. Arvailut, huhut ja väärät tiedot olisi korjattava heti oikeilla tiedoilla, ei erilaisilla puolitotuuksilla ja vähitellen myönnettävillä tiedonsirpaleilla.

Varsinainen ongelma ei tietenkään ole se, että arveluttavat vaalirahoitustavat ovat tulleet julkisuuteen, vaan se, että niitten julkisuuteen tuleminen on tapahtunut niin hitaasti. Asiahan olisi voitu hoitaa muutamassa viikossa pois, jos puolueet olisivat heti tuoneet koko totuuden julki ja sen jälkeen olisi käyty läpi, mikä on asianmukaista ja hyväksyttävää, laadittu hyvä laki ja alettu noudattaa sitä. Nyt sen sijaan vaalirahakeskustelu on jo puolentoista vuoden ajan vienyt huomiota muilta, periaatteessa tärkeämmiltä ja vaikeammilta kysymyksiltä.

Juuri näinä kuukausinahan on meneillään kaksikin kansainvälistä suurhanketta, jotka vaikuttavat aivan konkreettisesti Suomen, Euroopan ja koko maailman mittakaavassa hyvin moniin asioihin koko yhteiskunnan toiminta-edellytyksissä pitkälle tulevaisuuteen: EU:n Lissabonin sopimuksen hyväksyminen ja joulukuussa Kööpenhaminaan kokoontuva ilmastokonferenssi, jossa on tarkoitus laatia jatko Kioton sopimukselle. Kuinka paljon paremmin suomalaiset voisivatkaan olla tietoisia näitten vaikutuksista, jos puoletkin vaalirahojen selvittelyyn käytetystä ajasta ja mediatilasta olisi käytetty näihin?

*Mikko Mäkitalo*

## Aŭtunaj Tagoj 2009 en Pori

Dum bela aŭtuna vetero semajnfine de la 19a ĝis 20a septembro sukcese okazis la sinsekvaj Aŭtunaj Tagoj de EAF en la sudokcidentfinna urbo Pori (svede Björneborg, esperantigite el tio: Ursoburgo).

Preskaŭ sesdek personoj sekvis la inviton, kaj surprize granda kvanto (pli ol 10%) estis eksterfinnoj: de najbaraj landoj kiel Svedio, Rusio, kaj Estonio (kun laŭdinde granda delegitaro) aŭ Latvio, sed ankaŭ de Hispanio.

Kelkaj el ili partoprenis en simpozia diskuto kaj prezento de ekzemple estiĝo de la latva aŭ estona nacioj.

La finnlingvaj prelegoj de d-rino Anna Sivula (Universitata centro de Pori) kaj mag. Ilkka Koivusalo (de Rauma) kun traduko al Esperanto prilumis iom la historion de Finnlando kaj popularigo de la finna lingvo.

Dume la ĉefa gasto estis hungaro István Mórocz (vivanta en svisa Zuriko), kiu antaŭ 50 jaroj venis al Finnlando por studi kaj mem instrui


Esperanton en lernejo de Somero, sub gvido de konataj gravuloj kiel Joel Vilkki kaj Jorma Ahomäki.

Marjo Laine kiel lernantino el tiu tempo havis la grandiozan ideon kunvenigi la tiaman klason kaj sukcesis per persista laboro trovi ĉiujn krom la dume mortintojn.

La historio de István interesis ankaŭ la regionan gazeton "Satakunnan Kansa", kie aperis granda intervjuo kun foto – kaj plie sur la retejo de la gazeto aperis 8-minuta video, kiu vive montras la Cseh-metodan instruadon kun la ĵurnalistino Elna Kemppainen kiel lernantino.

En "Satakunnan Työ" jaŭde poste aperis intervjuo kun la rusa gasto Valentin Seguru.

Informteknike do rezultis bona rikolto. Pliaj artikoloj dum la kvarsemajna veturo de István tra Finnlando (de la 20a aŭgusto ĝis la 22a septembro) aperis en "Turun Sanomat" kaj la gazetoj de Somero kaj Kaarina. Plie estis mencio en Pola Radio.



*Harri Laine prezidas aŭkcion.*



*Trajneto Poritar ĉe Liisanpuisto.*

Post la rakonto de István okazis aukcio, kiun gvidis "nia" Humphrey Tonkin – Harri Laine.

Posttagmeze la loka trajneto "Poritar" ("Urboburganino") konatigis nin dum rondveturo al la urbo.

La enkonduko al Esperanto (de Tuomo Grundström) interesis preskaŭ dudekon da urbanoj, anoncita tra cirkulero al edukaj instancoj.

Vespere la Poria folkensemblo sub gvido de Risto Kupari dancigis partoprenantojn, prezentigis konataj kantoj ankaŭ en esperanta traduko de Tuomo.

Kortuŝe estis la amaso de alvenintaj salutkartoj el la vasta mondo – de foraj landoj ĝis najbaroj: de Kanado tra Italio, Hungario, Svedio ĝis Japanio alvenis dekoj da parte tre artismaj kartoj – dankegon al la sendintoj kaj la iniciatintoj!

Menciinde estas ankaŭ, ke dum la Tagoj partoprenis manpleno da FEJO-aktivuloj kune kun hispana pasporta-servano, kiuj trovis spacon en

la loĝejo de la lokanoj Paula kaj Robert. Estis tre agrable denove aŭ la unuan fojon renkontiĝi, dum bela aŭtuna vetero.

Restas al mi konstati, ke la Aŭtunaj Tagoj 2009 estis tre ĉarma kaj multe laŭdita kunveno.

Aktualigita rigardo de la programo, kun ligilo al la video kaj gazetartikola foto haveblas de la loka vikio ĉe <http://esperantopori.wiki-spaces.com>.

Grandan dankon mi direktas al ĉiuj, kiuj ebligis la semajnfino: al la tre konvena ejo Liisanpuisto, la eksterlandaj (ĉeĉape István) kaj finnaj gastoj, gazetaro kaj estraranoj de EAF: Päivi, Tuomo, Tiina kaj Paula, kiuj tiom laboris por krei sukcesan kulturalan kunvenon.

Haveblas cetere ankoraŭ salutkartoj el Pori, mendeblaj ĉe la EAF-oficejo.

Bildoj troveblas en albumo ĉe Ipernity: <http://www.ipernity.com/doc/brilanto/album/150350>

*Robert Bogenschneider  
Pori*

## LIBE kongresis en Pollando

La 75-a kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) okazis en la rekapablaga centro de viddifektitoj en Muszyna, suda parto de Pollando 18.–24.7.2009. Gastigantoj de la kongreso estis la Pola Asocio de Nevidantoj kaj Pola Esperanto-Asocio. La rekapablaga centro provizis taŭgajn lokojn por 94 partoprenantoj el 16 landoj, el Finnlando ses.

La temo de kongreso estis integriĝo ”Ni donu manon ĉiu al ĉiu, por ne maltrafi vojon, ĉar pli kaj pli estos urĝa la reciproka bezono...”. Pri la temo estis referaĵo de s-ino Aneta Bartic (Rumanio), ankaŭ parolis estroj de la distrikto. La kongresa programo estis kulturriĉa enhavante plurajn ekskursojn al historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj, koncertojn, la internacia arta vespero fare de kongresanoj mem estis la kulmino

de la semajno. Otto Prytz el Norvegio prelegis pri Louis Braille: ”La invento de jubileulo Louis Braille – daŭrigebla kaj daŭriginda”. Li pruvis, ke brajla skribo donis al blinduloj en la tuta mondo aliron al klareco kaj kulturo, kaj nun, kvankam la komputilaj teknologioj ĉiam pli disvolviĝas, ĝi daŭre estas bezonata. Aldo Grassini el Italio konatigis kongresanojn kun operoj de mondafama itala komponisto Giacomo Puccini.

Pier Luigi Da Costa el Italio rakontis pri sia laboro surdiskigi Plenan Ilustritan Vortaron konsistantan el de li mem brajligitaj 74 volumoj. Li skanis la tutan tekston kaj adaptis ĝin por laboro kun voĉsintezilo kaj eĉ anstataŭigis bildojn per vortaj klarigoj. Attila Varro el Hungario montris, kiel uzi la vortaron.







*Kongresanoj en pramoj, kiujn junaj viroj per longaj bastonoj puŝis antaŭen. Flosado sur la rivero Proprac proksime de la landlimo de Slovakio estis refreŝiga paŭzo en varmega tago.*

### Defioj por la nova agadperiodo

La Ĝenerala asembleo de LIBE konfirmis la raportojn pri la jaro 2008 kaj aprobis agadplanon por la jaroj 2009–2013. La ĉefaj kampoj de la venonta kvarjara periodo estas edukado, junularaj renkontiĝoj, informado kaj ekonomio, se ebla ekonomia.

La agadplano kuraĝigas naciajn esperantuinojn kaj naciajn blindul-organizaĵojn progresigi disvastigon de esperanto kaj konservadon de pli ol centjara esperantokulturo ankaŭ inter viddifektitoj kiel unu komunikilo en internaciaj

◁ *Kiam poldevena papo Johano Paŭlo II vizitis Pollandon en 1979 estis konstruataj altaroj por subĉielaj mesoj. La plej bone konservata altaro troviĝas en Stary Sacz, kie papo parolis al 650 000 homoj. Antaŭ la altaro staras Andrea Varro, Attila Varro redaktoro de Esperanta Ligilo, Dragan Ŝtokoviĉ ĝenerala sekretario de LIBE kaj Arvo Karvinen prezidanto de LIBE. Ŝtupojn subeniras Kerttu Rita.*

kontaktoj. La internacia lingvo esperanto estas unika ilo de internacia komunikado, kiu ofertas al ĝiaj uzantoj veran egalrajtecon. Esperanto pruvis sian taŭgecon al ĉiuj komunikaj bezonoj. Universala Esperanto-Asocio emfazas la signifon de vera internacia lingvo kaj lingvaj rajtoj de ĉiuj nacioj.

Kunlaboro estas iniciatata kun organizaĵoj de instruistoj ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj ICEVI (International Council for Education of People with Visual Impairment). La celo estas, ke ankaŭ aŭtoritatuloj pri edukado denove subtenu instruadon de esperanto kaj ke ili tiel apogu interkulturajn rilatojn de viddifektitoj.

Lernado de esperanto samtempe en pluraj landoj inter gejunuloj post lernejoj riĝigas vivmedion ofertante eblecon al internacia partopreno, kaj siaparte preventas retiriĝon. En interreto troviĝas esperantokursoj, ekz. [www.edukado.net](http://www.edukado.net)

Pere de esperanto i.a. eblas konatiĝi kun la ▷

monda literaturo, ekz. la nacia biblioteko en Britio (Stockport) enhavas valoran kolekton de brajligitaj libroj.

### **Nova estraro de LIBE**

La Ĝenerala asembleo elektis novan 7-membran estraron por la kvarjara periodo:

prezidanto Arvo Karvinen, Finnlando  
ĝenerala sekretario Dragan Štokovič, Kroatio  
vicprezidanto Nedeljka Lozajić, Serbio  
dua sekretario Anatolij Masenko, Rusio

kasisto Pier Luigi Da Costa, Italio  
estraranoj Natalia Kasymova, Germanio kaj  
Vladimir Ĵelev, Bulgario.

LIBE celas progresigi inter viddifektitoj esperanton kaj internacian kunlaboron sur la kultura kampo. La revuo Esperanta Ligilo aperas ĉiunmonate brajle kaj rete. LIBE-anoj abonas ankaŭ aliajn esperantopublikaĵojn.

*Teksto Arvo Karvinen,  
fotoj Ritva Sabelli kaj Sylvia Hämäläinen*

---

## **La kongreso de LIBE 2009**

Esperantoligo de blinduloj havis sian kongreson 18.-24.7. en Muszyna en suda Pollando ĉe la landlimo kun Slovakio. La kongresejo estas la ripozejo de polaj blinduloj, nomata Nestor. Ĝi estis bona loko por loĝi kaj elirpunkto al niaj multaj ekskursoj. La ĉirkaŭaĵo estis bela. Nestor situas en la valo de la rivero Proprad kaj ambaŭflanke de la rivero la arbaraj deklivoj leviĝis alten jen proksime, jen malantaŭ grandaj herbokampoj aŭ deklivaj paŝtejoj tiel, ke la vidaĵoj estis vastaj. Ne malproksime estis centro de montaraj vintrospertoj.

El Finnlando al la kongreso veturis 6-persona grupo, Arvo kaj Ritva el Helsinko, Kerttu, Riitta kaj Matti el Kouvola kaj Sylvia el Ylöjärvi. La veturo tien daŭris tutan tagon, ĉar ni devis ŝanĝi flugon kaj el Krakovo suden veturi kvar horojn buse. En Munkena flughaveno ni estis veturigataj per "propra" aŭto al la atendejo de la dua flugo kaj estis tre afable helpataj, same kiel en la unua flugo reen. Surveture ĉio sukcesis bone, feliĉe.

La vetero tutan tempon estis varmega, iun tagon eĉ tro varma por ni por promenekskursi. Ĉiutage okazis unu aŭ pluraj ekskursoj. Ni ekzemple vizitis la plej faman malnovan kuraclokon Krynica, kiu tamen ankoraŭ hodiaŭ havas modernajn kuracejojn. Tie ni gustumis mineralan akvon, kies mineraloj kuracas "preskaŭ kion

ajn". Sed la gusto ne estis tre agrabla. Ni ankaŭ sentis, nur per fingropintoj, kiel varmega (65°–75°) la minerala akvo estas, kiam ĝi eliras rekte el la fonto.

Alia por poloj tre grava loko estas en Stary Sacz, nome la altaro, kiu estis konstruita okaze de la vizito de Papo Johano Paulo II en 1979. Ĝi estas bela konstruaĵo sur altaĵo. Ĉio estas bone prizorgata kun florbedoj kaj fluanta roĵo. Antaŭ la altaro estas treege vasta kampo, herbejo, sur kiu kolektiĝis 650 000 homoj por aŭskulti Papon.

Por mi la plej interesa sperto estis 10 km-a flosado sur la rivero Proprad. La flosado estis el vitrofibro kun 30–40 cm altaj randoj. Sur ĝi ni sidis en seĝetoj kaj neniu havis savveŝtojn (!), eĉ ne la du viroj, kiuj stiris la floson per longaj stangoj antaŭe kaj malantaŭe. Ŝajnis, ke la akvoprofundo variis inter malpli kaj pli ol 50 cm. Iam ni tuŝis iun rapidfluan ŝtonon, iu alia flosado (ni estis 5–6) eĉ haltis pro ŝtono kaj la flosisto devis salti en preskaŭ unumetron profundan akvon kaj liberigi la floson. En la rapidflujaj lokoj la akvo ondadis vigle kaj eĉ ĵetis akverojn en la floson, sed kontraŭe ekzistis ankaŭ trankvilaj momentoj kiam la akvo ŝajnis ĝui pri sia fluetado antaŭen.

En la kongresejo ni povis aŭskulti plurajn interesajn prelegojn, ĉeesti la ĝeneralan asembleon de LIBE kaj partopreni en cerbumado de la



*Vizito al “Abelreĝlando Kamianna” konatigis kongresanojn kun abelbredado kaj produktado de mielkuraciloj – ni aŭdis, palpis, gustumis kaj eĉ spiris. Sylvia Hämäläinen asistas por ke Riitta Ekola ricevu salubrigan dozon de inhalado en abelulo.*

malfacila parto de esperantogramatiko. Vespere la programoj okazis en la korta pavilono, tre ofte kun tro laŭta akustika muziko. En la adiaŭa vespermanĝo Steleto (= tri personoj) regalis la partoprenantaron per botelo da vino por ĉiu tablo

okaze de la 90-jara jubileo de Steleto. Kaj fine venas la grava afero pri kio Ritva jam skribis en la antaŭa Esperantolehti: nia Arvo Karvinen estis elektita prezidanto de LIBE. Gratulon!

*Rememoris helpanto Sylvia Hämäläinen*

## Regularo pri ekzamenoj por blinduloj

Laŭ mia scio blinduloj partoprenis la Internaciajn Ekzamenojn du fojojn. Dum la kongreso de LIBE en Onnela 1995 ekzameniĝis ses kaj en Prago 1996 sep kongresanoj. Espereble ekzamenoj iom post iom allogos pli, ĉar nun haveblas regularo, kio konsideras partoprenon de vidhandikapitoj.

S-ino Mireille Grosjean, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono IEK verkis regularon pri ekzamenoj por blinduloj. Ĝi priskribas kiel okazigi ekzamensesion de ses diversaj partoj por testi lingvokapablon.

Ĉi tiu nova regularo estis aprobita en Krakovo, Pollando dum ILEI-konferenco, fare de la ILEI-komitato, kaj en Bjalistoko, dum UK, fare de la UEA-komitato en somero 2009. La unua ekzamensio por blinduloj laŭ la nova regularo okazos en Kopenhago dum UK 2011. Do estas sufiĉe da tempo por prepariĝi.

Pliaj informoj pri la Internaciaj Ekzamenoj ĝenerale haveblas en gvidilo elŝutebla ĉe [www.ilei.info/dok/int\\_ekzamenoj\\_3a\\_eld\\_interno1.pdf](http://www.ilei.info/dok/int_ekzamenoj_3a_eld_interno1.pdf)

*Ritva Sabelli*

## Pri Institutoj Zamenhof, TIETO kaj ties radikoj

Instituto Zamenhof (IZo) estas privata nekomerca lernejo de pli ol 400 lernejoj en Lome, Togolando, france nomata Institut Zamenhof. Ĝi malfermiĝis en septembro 1984, transprenante la taskojn de Hans Bakker en Togo. Pro kulturaj, historiaj kaj sociaj kaŭzoj kaj la granda nombro de lingvoj kaj dialektoj parolataj en Togo, la lingvo de la instituto estas la franca, sed ankaŭ Esperanto estas grava kaj la instituto ĉiujare instruas ĝin, naskante dekojn da esperantistoj. La centro de la agado de IZO estas la homo.

### Celoj:

- helpi infanojn de nepagipovaj gepatroj lerni legi kaj skribi;
- helpi ilin rilatigi kun samaĝuloj tra la mondo uzante komputilon kaj Esperanton;
- ebligi al gejunuloj vivteni sin;
- organizi vesperan kurson al analfabetaj plenkreskuloj;
- okazigi instruadon ankaŭ en la loka lingvo evea;
- instrui pri higieno, salubra manĝado, konduto en familio, edukado de infanoj, respondecoj en la komunumo, mediprotektado k.a.;
- provi prizorgi ankaŭ tiujn, kiuj ne kapablas lernejanigi;
- krei mondonajn aferojn por nepagipovaj gepatroj.

### Kadre de IZO:

La kvartalanaj diskutoj pri siaj ĉiutagaj aferoj kaj problemoj. Eksterlandanoj estas invitataj gastoj kaj spertaj vivadon en afrika medio. Estas organizataj ludoj kaj festoj, la principo estante, ke ĉiuj, escepte de neniu, profitu el la laboroj de IZO.

La lernejestro Gbeglo Koffi eklernis Esperanton en 1984. En la jubilea UK en Varsovio



en 1987 Veera Tietti invitis lin al sia hejmo, kie Koffi poste pasigis tri monatojn. Li kaj Hemmo Tietti (origine Helmuth Dibelius el Germanio) havis komunajn interesojn: parapsikologio, stenografio, religioj. Laŭ Koffi la tri monatoj ĉe Hemmo en Finnlando egalas al sep jaroj de altlernejoj pri religiaj aferoj. Li lernis ankaŭ kiel vivi kaj manĝi por ne damaĝi sian sanon aŭ kaŭzi doloron al bestoj. Li konsideras la geedzojn Tietti, kiuj ĉiam lin subtenis morale kaj finance, kiel siajn gepatrojn en Esperantujo. Omaĝe al ili la instituton, kiu gvidas E-aferojn en Togolando kaj helpas la E-movadon en ekstera Afriko, Gbeglo nomis TIETO. Tio estas akronimo de Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando. (Bonŝance "tieto" estas ankaŭ vera fina vorto, kiu signifas "sci/ig/o, informo".) Kvankam Hemmo siatempe deziris postmorte anonimiĝi kaj ne havi memorŝtonon sur sia tombo, nun filo de kuzo de lia patro faras genealogian tabelon pri la familio Dibelius kaj prezentos ĝin oktobre dum familia festo en Germanio. Tio kaj la Instituto TIETO ne lasas nin forgesi gesinjorojn Tietti.

*Saliko*

## Esperanto en malluksa Afriko

La kresko de esperantistoj en kelkaj tre malriĉaj landoj montras ke Esperanto ne estas nur luksaĵo praktikata de intelektuloj en riĉaj landoj. En pasinta januaro Svetlana Milanović kaj mi mem donis kursojn por komencantoj kaj progresantoj en Burundo, ĉe la lago Tanganjiko, unu el la dek plej malriĉaj landoj de la mondo.

Ĉar la entuziasmo por niaj kursoj estis ege granda, ni engaĝiĝis ne nur bone instrui ilin, sed ankaŭ trovi manierojn por helpi organizi ilian asocion. Pro la malriĉeco kotizado de membroj de kluboj estas nepraktikebla. Jam kurslibrojn la burundanoj ne povas aĉeti kaj se iu havas kurslibreton, ĝi estas baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj.

Kion fari? Ni elpensis kaj decidis helpi stariĝi Esperanto-centron, kie la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi, kie gardatos Esperanto-libroj kaj kie, por havi enspezojn, estos komputiloj kun ret-aliro por la paganta publiko. La konstruado de la centro devos esti financata pere de monvarbado inter pli riĉaj esperantistoj en la mondo. Ni fondis fondajon "Esperanto en evoluo" kun propra retejo, kiu celas ne nur helpi financi la Esperanto-centron en Burundo, sed ĉiujn profitodonajn projektojn en malriĉaj landoj, kiuj celas doni bezonatan financon bazon al la tiea Esperanto-movado.

Se vi volas scii pli, klaku al <http://esp-evoluo.tk>, kie vi konatiĝos kun la internacia estraro, la urbo Rumonge, kie la Esperanto-centro estas planita kaj kun niaj amikoj tie. La kontonumero por donaci al la centro estas 1312.96.116 de "St. Esperanto en evoluo" favore al 378964 ĉe RABObank, Nederlando (la BIC estas PSTB NL21 aŭ uzu IBAN-numeron NL24P-STB0000378964). Ankaŭ ĉe UEA estas konto nia kun kodo eeer-u.

*Johan Derks*

## Respondo de Brazilo al Daŝgupta

En junio la Prezidanto de UEA Probal Daŝgupta sendis leteron al la brazila, ĉina kaj rusa ŝtatestroj kaj al la barata ĉefministro, kiuj kunvenis kelkajn tagojn pli frue por diskuti pri la monda ekonomia krizo kaj pri pli intensa kunlaboro inter siaj landoj ĝenerale. La prezidanto de UEA atentigis ilin pri la bezono de nova lingva sistemo, kiu ne privilegiu kelkajn landojn, kaj pri Esperanto kiel la lingvo, kiu ebligus ĝin.

Intertempe prof. Daŝgupta ricevis la ĉi-suban respondon komisiitan de la brazila prezidento Lula da Silva:

"Prezidento Luiz Inácio Lula da Silva taskis nin respondi vian leteron de la 20-a de junio 2009 adresitan al li, por danki pro via zorgo pri la egaleco en internaciaj rilatoj, tiel en la financa kiel en la lingvaj aspektoj. Ni ŝatus montri al vian admiron pro la klopodo, kiun esperantistoj de la tuta mondo entreprenas cele al la disvastigo ĉiam pli granda de Esperanto, lingvo kreita de doktoro Lazaro Zamenhof kiel kontribuajo por la interkompreno kaj komprenemo inter la homoj. Ni scias, ke en la historio de la homaro, estis lingvoj, kiuj enrudigis kiel sekvo de la politika hegemonio, kiel latino, aŭ certagrade la franca kaj poste la angla. Ni deziregas ke, fakte, iun tagon Esperanto povu esti akceptita de plejparto de la nacioj kiel lingvo adoptita por faciligi la komunikadon sen lingvaj privilegioj. Ni certas, ke Universala Esperanto-Asocio daŭrigos siajn demarŝojn ĉe Unuiĝintaj Nacioj por laŭgrade pligravigi la rolon de Esperanto kiel internacia lingvo. Sekve ni ne vidas necesa pridiskuti la aferon, ĉar ni konsentas pri la valoro de la lingvo disvastigata de via asocio.

Sincere,

Cláudio Soares Rocha

Direktoro pri Historia Dokumentado"

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Pli da servoj ĉe UEA

Ekde 2010 la oficiala organo de UEA, la revuo "Esperanto", estos legebla rete kontraŭ malpli alta pago. Jam ekde 2004 la Membroj-Abonantoj, Dumvivaj Membroj kaj Honoraj Membroj povas legi ĝin rete samtage, kiam la redaktoro transdonas ĝin al la presejo, sed ekde 2010 sufiĉos pagi la kotizon de Membro kun Jarlibro. Ankaŭ la plej malmultekosta membrokategorio de UEA, Membro kun Gvidlibro, ricevos novan servon en 2010, retan novaĵbultenon, kiu aperos ĉiumonate.

Jam de longe la individuaj membroj rajtas 2-foje jare mendi librojn kaj aliajn varojn ĉe la Libroservo de UEA kun rabato de 10%. Ekde nun la Membroj-Abonantoj, Dumvivaj Membroj kaj Honoraj Membroj ricevas la rabaton ĉiufoje, kiam ili mendas. La limo de 2 mendoj restas nur por la kategorioj MJ kaj MG.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Filmoj de UEA rete

La 6-an de oktobro aperis la 5-a numero de la filmjurnalo UEA viva kun tri eroj. Unue Emilio Cid raportas pri la rezultoj de la informkampanjo ĉirkaŭ la 94-a UK en Bjalistoko. En la dua ero, pruntita el la televida servo de UN, oni vidas elpaŝon pri lingvaj rajtoj fare de la UEA-representanto Mireille Grosjean ĉe la Homrajta Konsilio de UN fine de septembro. La fina parto estas de TEJO sinprezento de la nova estraro.

La reta kinejo de UEA ĉe Ipernity pliriĉiĝis per valoraj historiaj dokumentoj. La filmo "Lingvo festis naskiĝtagon" de Michael Cwिक raportas pri la impona UK de la Jubilea Jaro 1987 en Varsovio. Scenojn el la Budapeŝta UK en 1966 montras la filmo "Esperanto-fonto". La plej lasta el la novaĵoj estas dokumenta filmo pri la 48-a UK en Sofio en 1963. Ĉiuj ĉi trezoraĵoj devenas el la Biblioteko Hodler, kies filmojn UEA iom post iom ciferecigas.

La adreso de la reta filmjurnalo en YouTube

estas [www.youtube.com/user/UEAviva](http://www.youtube.com/user/UEAviva) kaj tiu de la reta kinejo en Ipernity [www.ipernity.com/home/97850](http://www.ipernity.com/home/97850).

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Malferma Tago ĉe UEA

La 31-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 28-an de novembro 2009, estos dediĉita al la 100-a datreveno de la naskiĝo de **Ivo Lapenna** (1909–1987), la longtempa ĝenerala sekretario kaj prezidanto de UEA. Prof. Carlo Minnaja faros du prelegojn pri la vivo kaj verko de la legendeca oratoro kaj movada gvidanto, kaj rememorojn prezentos ankaŭ prof. Duncan Charters.

Kiel reprezentantoj de la kongreslando de la UK en 2010 vizitos la Malferman Tagon ges-roj Norberto Díaz Guevara kaj Yoandra Rodríguez Labrada el Kubo. Okazos ankaŭ prezentado de novaj eldonaĵoj. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## UEA ĉe konferenco de ALTE kaj Goethe-Instituto

Representanto de UEA kaj ties nova ekzamen-sistemo laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), Zsófia Kóródy, partoprenis en komuna konferenco de Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE) kaj Goethe-Instituto de la 18-a ĝis la 19-a de septembro en Berlino. La konferenco okazis kadre de la programo "Lingvoj sen limoj" kun la ĉeftemo "Lingvo kaj integriĝo". Ĉeestis kaj prelegis internacie konataj fakuloj de lingvotestado.

UEA aktive partoprenas en la laboro de la specialaj interesgrupoj (SIG) de ALTE. Jam antaŭ la konferenco Zsófia Kóródy ricevis dankvortojn de la ALTE-sekretario pro la kontribuo al la finredakto de "Manlibro por testprikaksado kaj ekzamenado". Laŭdinda estas la laboro de Gerald Tucker, fakestro por ekzamenoj de Ger-

mana Esperanto-Instituto.

Dum la konferenco en Berlino Zsófia Kóródy havis la okazon paroli kun kunlaborantoj de ALTE pri la ekzamena regularo por blindaj esperantistoj, kiun aprobis la Komitatoj de ILEI kaj UEA en julio 2009.

*(el informoj de Ret-Info koncizigis mm)*

## Konferencas Unesko

La 6-an de oktobro okazis en Parizo la inaŭguro de la 35-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, kiu daŭros ĝis la 23-a de oktobro. Tiu ĉi supera organo de la organizaĵo kunvenas ĉiun duan jaron kunigante reprezentantojn de la 193 membroŝtatoj por difini la politikon kaj agadprogramojn de Unesko. Ses personoj reprezentas la mondan esperantistaron en la konferenco. Pro siaj oficialaj rilatoj kun Unesko, Universala Esperanto-Asocio estas aŭtomate rajtigita partopreni la Ĝeneralan Konferencon kiel observanto.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Antologio por la tuta mondo

Lusiadas Eldonejo, por plifortigi la esperantan literaturon, invitas la amikojn samideanojn por partopreni en la I Antologio Luzidoj. Aŭtoroj de la tuta mondo povas partopreni, kun tekstoj (rakonteto aŭ poezio) en Esperanto, originalaj aŭ tradukitaj (se vi sendos literaturon tradukitan bonvolu atenti al kopirajto). Ni ricevos tekstojn ĝis 15 de novembro, post tiu dato, la teksto atendos novan antologion. Eldonejo ne redonos la tekstojn. La limo de ĉiu RAKONTO estas mil vortoj kaj POEZIO estas du paĝoj en la formato 14 cm x 21 cm. Rando: 2 cm, korpo 12. Ni ricevos la tekston (RTF arĥivo) per retmesaĝo [editora@lusiadas.com.br](mailto:editora@lusiadas.com.br) (ESPERANTO), kun mallonga biografio, adreso, kaj via bildo, por meti en via biografia paĝo. La kopirajto de ĉiuj verkoj estas de la aŭtoro, kaj la sendado de via teksto signifas plenan akcepton de "Regularo".

Vidu ankaŭ [www.lusiadas.com.br/eo](http://www.lusiadas.com.br/eo)

## Jyväskylänsyöksyn toimintaa

Jyväskylänsyöksyn Esperantokerhon tapaamiset ovat Sepänkeskuksen Happi-huoneessa, Kyllikinkatu 1, joka toinen maanantai kello 15.

Syöksyn ja talven opintopiiriin teemana on Entisajan elämää – Rememoroj. Alustukset ovat esperantonkielisiä, mutta keskusteluun voi osallistua myös suomen kielellä.

- ma 19.10 Hallituksen kokous klo 15-16 ja klo 16-18 opintopiiri: Riihenpuinti, Pentti Makkonen
- ma 2.11. Opintopiiri: Isän kanssa kalassa, Seija Kettunen
- ma 16.11. Yhdistyksen syyskokous
- ma 30.11. Opintopiiri: Lypsyllä, Kimmo Hannula
- ma 14.12. Opintopiiri: Entisajan joulunviettoa, mukana myös jouluista tarjoilua.

Ensi vuoden toiminta käynnistyy ma 11.1. ja opintokerho jatkaa samalla teemalla. Kevätretkeä ensi toukokuun lopussa suunnitellaan jo. Kohde on todennäköisesti Keuruun Ekokylä.

*Kerhon pj Seija Kettunen, puh. 040 867 2743*

## Studanta grupo en Tampere

La 15-an de septembro kunvenis la unuan fondon Tampere-aj studentesperantistoj. Ĉeestis ses studentoj el universitato de Tampere, teĥnika universitato de Tampere kaj faklernejo de Tampere. Tri el ni jam konis iomete Esperanton.

Oni prelegis iom pri la historio de Esperanto kaj instruis oftajn frazojn (do ĉiuj parolis esperante kaj povas konatiĝi kun homoj tute en Esperanto) kaj parton de la baza gramatiko. Oni ankaŭ diskutis pri la estonta agado de Tampere-aj gejunuloj. En la proksima estonteco oni daŭre kunvenos marde je 18.30 en Nesto, kaj ankoraŭ ne fondas propran societeton por la gejunuloj.

*(el mesaĝo de Markus Sunela en retlisto de FEJO redaktis mm)*

## Ekskurso al Valamo de Ladogo somere 2009

Dum sunbrila pasintsonera vespero promenante apudlage en Jyväskylä kune kun Seija kaj Kari Kettunen kaj Tiina Oittinen, naskiĝis la ideo pri vizito al la rusa Valamo por celebri la 10-jariĝon de la kursoj en la finna Valamo. Baldaŭ post la kovado de la plano plenumentuziasme Tiina dissendis informojn pri la dezirata ekskurso kaj komenciĝis la varbado.

Mi ja mem deziris vidi tiun lokon, ĉar longe mi aŭdis dum la vizitoj al la Nova Valamo la historion de la monaĥoj forirantaj en frosta vintro tra la lago, la peza migrado al Finnlando, la fondado de la monaĥejo en Finnlando, ktp.

Tuj post la ĉijara kurso la grupo de 7 Esperantistoj ekiris, do, al la naskiĝlando de la iamaj fondintoj de Nova Valamo. La vojaĝon aranĝis loka vojaĝagentejo el la urbo Joensuu en orienta Finnlando kaj nia esperantista grupo povis aliĝi al grupo de 30 vojaĝantoj el Finnlando.

Pri Rusio mi konservas belajn memoraĵojn pri la ŝika Sankta-Peterburgo kaj pri la griza Moskvo, tra kies stratoj mi longe piediradis antaŭ preskaŭ 20 jaroj kiam mi forte strebadis lerni la rusan. Kion mi certe trovos en la insulo Valamo neniel similos al tio, kion mi iam vidis de Rusio. Des pli multe mi scivolis pri la tuto!

La monaĥejo troviĝas meze de mirinda naturo, kie la abundo de verdo kaj bluo pro la senfinaj arbaroj kaj sennombraj lagoj estas io daŭre fiksita en mia memoro. En la insulo, la mano de la homoj ne multon transformis kaj la vivo tie estas organizita ĉirkaŭ la monaĥejo.

En mia dormoĉambro, iama loĝejo de monaĥo, prezidis ikono de Sanktaj Sergeo kaj Hermano kaj la fenestro frontis al la turoj de la monaĥejo. Tiuvespere, kiam sunsubiris la ĉielo kovris sin de palruĝa koloro kaj la preĝejo aspektis kiel envolvita en flamoj, verŝajne por rememorigi al ni la spiritan fortecon ĉie ŝvebanta

en la insulo gardanta en sia koro la tie tombojn de la sanktaj fondintoj.

Ĉio tie meritas viziton: la bele restaŭrataj monaĥejo kaj diversaj preĝejoj, la melodio de la ortodoksa muziko dumkoncerta kaj en la ceremonioj, la padoj ornamitaj de sovaĝaj floroj, la ĉarmaj etaj vendejoj de ikonoj, la tombejoj plenaj je mirindaj rakontoj, ktp.

Aparte danka mi estas al Tiina pro tiom multe, kion ŝi faris por faciligi mian ĉeeston en tiu ekskurso, interalie, ekzemple, per daŭra interpretado de ĉiuj informoj donataj de niaj ekskursgvidantoj (kio siaflanke permesis al pluraj povi paroli pri Esperanto en la grupo al homoj ne konantaj la lingvon en kiu mi estis alparolita).

*Atilio Orellana Rojas*





## Ne ebla? Mi igas ebla.

Mi eksciis pri E-o, kiam mi legis "Plezura vojaĝo en E-lando" verkitan de s-ro Kyotaro Deguĉi, Oomoto-konsilisto kaj nepo de majstro Onisaburo Deguĉi. Tiam mi diligente lernadis la anglan, tamen mi raviĝis pri egaleco, facileco kaj homa emancipiĝo de E-o, sed mi nur decidis lerni ĝin iam. Post 30-jara dormado, kiam mi estis 55-jaraĝa, mi eklernis E-on. La decido ankaŭ estis mia viv-defio por popularigi E-on.

La lernado estis ege malfacila, ĉar mi devis prezidi 1600 kompanianojn. Mi laboras 2/3-tempe, lernadas trione, mi ne vidis eĉ televidon dum 13 jaroj kaj investis 10 000 horojn por lerni E-on.

Mi decidis kaj veti mian tutan energion kaj flamigi la lingvan revolucion per tutpaĝaj anoncoj. Per la pensia mono kaj kunhelpo de bofilo, en 2002 en Danlanda "Berlingske Tidende" mi unue aperigis titpaĝan anoncon. Kompreneble, kunhelpo de landaj asocioj, eks-prezidanto de UEA Corsetti kaj prezidanto de EEU d-ro O'Riain.

Sekvis "European Voice" en Belgio, "La Repubblica" en Italio, "Le Monde" en Francio kaj "Die Zeit" en Germanio, kaj 8 mez-eŭropaj landoj. Tiam mia mono elĉerpiĝis. En 2004 mi povis daŭrigi la kampanjon per profito de "Walkin' Bag". Ĉar la estraranoj de Swany decidis ke mi rajtas uzi 10%-n de la profito. Sub kondiĉo de forcedo de miaj patentaj rajtoj al kompanio.

Post 15 anoncoj d-ro O'Riain sugestis, ke mi daŭrigu nur en Francio, ĉar ili tenas en mano la ŝlosilon por lingvo-revolucio. Mi koncentriĝis al "Le Monde" dum kelkaj jaroj. Se ili

ek-moviĝos, mi ŝanĝos lokon de anonco al Germanio.

Se Francio kaj Germanio vekiĝos, la ceteraj 25 EU-landoj sekvos ilin, laŭ E-istaj gravuloj. Ekde nun mi reklamados kaj ordigas diversajn opiniojn de prez. de UEA d-ro Daŝgupta, EEU-gravuloj kaj anoj de franca kaj germana E-o-asocioj. La naskiĝo de EU estas la unua kaj lasta ŝanco de nia historio. Se Eŭropa Unio ŝanĝiĝos, tio influos al la mondo.

*La artikolo estas koncizaĵo de prelego de Etsuo Miyoshi en UK en Rotterdam*



*Etsuo Mijoŝi el Japanio faris bonan komercan gajnon per bastonvalizo, kiun li inventis, kaj uzas la profiton por financi anoncojn pri Esperanto en gazetoj.*

◁ *De maldekstre la ekskursantoj: Atilio, Onni, Risto, Tiina, Raimo, Synnöve kaj Merja (fotis unu de la kunvojaĝantoj).*

Liisa Tuovinen

### **Kiam ĉio ŝanĝiĝas**

mi rigardas ekranbildojn  
ĉu similaspektas cerbo mia  
ĉu oni tiel penetras en homan profundegon  
oni kaŝrigardas perbilde estonten  
mi aŭskultas eksplikojn senkomprene  
ĉu komprenas la alia

progresos  
kiom longe  
individuece  
oni ekprovos tiujn ĉi pilolojn

kiam ĉio ŝanĝiĝas  
oni vivas de tago al tago  
kiaj banalajoj  
kiel alie mi povas vivi  
ja mi eĉ duonhoron ne povas foresti  
jam sonas telefono  
ĉu vi jam estas tie  
ĉu vi baldaŭ venos  
ĉu vi longan tempon forestos

aŭ ĉu mi jam hodiaŭ manĝis  
kompreneble  
jam ni manĝis  
ĉu vi malsatas  
ĉu mi pretigu ian manĝaĵon  
atendu momenton, baldaŭ pretos

oni vivas tagon pofoje  
po hore  
po minute  
kaj plue

li piediradas kaj eksterenrigardas tra fenestro  
sekve tra alia  
kaj poste denove  
la varpoj de la orienta tapiŝo  
brilas kiel hela pado  
montras vojon alfenestre

tiam  
kiam ĉio ankoraŭ estis bone

ĉu vi memoras rivereton  
tie en montaro  
ni fumis por kvietiĝi  
post sukcesa iro trans rivereto  
li demandas  
ĉu ni jam hodiaŭ manĝis

vi ja ĉi tion ne volis  
kaj mi ne  
ni planis:  
tiam ni vojaĝos, oni aĉetos pli grandan loĝejon  
aŭ pli malgrandan  
se ni multan tempon forestos de hejmo  
ni mondon ĉirkauiros  
restos multo ĝis nun ne vidata  
tempon ni ja havas  
tempon por kio?

kioma horo estas?  
baldaŭ la deka  
enlitiĝo je la deka horo  
vekiĝo je la sesa  
kioma horo estas?  
baldaŭ la deka  
nun mi brosas la dentojn  
por poste dormi kaj vekigi je la sesa  
kioma horo estas?  
ĉu jam estas la deka  
jes, estas, nu jes, jes,  
baldaŭ estos la deka  
vi povas brosi la dentojn  
kaj nun por dormi kaj vekigi je la sesa horo

mi tion ne volis, ankaŭ vi ne  
blanketaj loketoj  
pligrandiĝintaj cerbofaldoj  
spacoj por tumultado de pensoj  
kiaj pensoj kaj denove kioma horo estas  
kial neniu diras kion tio signifas  
ke oni kunvivas dudek kvar  
horojn tagnokte  
sesdek minutojn en la horo  
eĉ en necesejo vi ne rajtas sidi pace  
kial vi restas tie tiom longe

*jam eliru*

*oni kaptis lin sursojle,  
li estis foriranta  
kien, tion li ne sciis  
aŭ ne diris  
kial nun por la edzino  
ĉion indas rakonti*

*kiam ĉio ankoraŭ estis relative bone  
oni vojaĝis  
oni promenadis laŭ fremdaj stratoj  
oni kolektadis memoraĵojn  
kun kiu mi nun rememorigu ilin*

*mi incitiĝis kiam li tutan tempon telefonadis  
kaj demandadis  
kie mi estas  
kiam mi venos*

*nun kiam li ne plu telefonas  
mi kuras por vidi  
ĉu li falis  
sufokigas  
kontuziĝis*

*dumnokte ĉio estas pli malfacile  
mi aŭskultas la spiradon  
aŭ kiam li kriis ensongĉe  
mi remetas la litkovrilon  
mi emas konsoli*

*mi estas familia prizorganto  
fortege mi flegas  
dudek gutojn matene  
kaj dek vespere  
mi ŝanĝas pisprotektajn tukojn  
mi lavas kaj survestas  
mi viŝas la postajojn*

*oni pagas al mi pro tio  
sed per la mono oni ne eblas aĉeti dormon  
ni sidas flanko ĉe flanko  
mi tenas lian manon  
kaj li demandas:  
ĉu vi diskutis kun mia edzino?*

*Jes, mi ĉiutage diskutas  
li denove dumnokte falas  
mi vokas ambulancon  
kaj viroj relevas lin sur la liton  
li puŝas sian irapogilon  
malrapide al la dormĉambro  
kaj al la vivĉambro  
kaj al la dormĉam ....*

*en fleghospitalo oni survestis lin per ĉemizego  
zipo dorsflanke  
jam ĉesis striptizado  
kaj kiam li falas nokte  
oni relevas litbarilojn  
ne plu li vagados  
hejme ne estas litbariloj  
mi forportas rubaĵojn  
mi profunde spiras freŝan frostaeron  
ĝi estas mia matena rondpromenado  
hodiaŭ li ne rekonis min  
li preterrigardis  
demandis kie mi estas  
mi ekrigardis malantaŭen  
kaj mi ne plu ekzistis*

*kiam kuracisto diras  
ke hejme ne plu sukcesos flego  
ke en hospitalo oni povas atendi liberan  
maljunulejan lokon  
li demandis nur:  
ĉu la hararo bonaspektas*

*mi iradas enhejme de ĉambro al alia  
mi riproĉas min mem, ke mi ne havis  
forton lin flegi  
nokte mi vekigis  
mi iras por vidi ĉu li denove ien vagadas  
unu parto de mi foriris kun li*

*mi vizitas lin,  
mi veturigas lin hejmen por ferii  
oni bakas platkukojn  
kaj post la manĝado  
li volas reiri al hospitalĉambro  
li diras*



## Kongreso en Bjalistoko Malnovaj esperantistoj renkontiĝis

Jorma Ahomäki rakontis pri esperanto en tri gazetoj. Unu artikolo estis en Kaarina-lehti (19.8.2009), aperanta en Kaarina, komunumo ok kilometroj de Turku al sudoriento. Du aliaj artikoloj aperis en Turun Sanomat. Estis pri la memoraĵoj pri esperantolernado en lernejo de Rauvola en 1959 en Kaarina (27.8.2009), kaj en alia Jorma Ahomäki skribis pri sia vojaĝo al Kuressaare, urbo de la insulo Saaremaa. La lasta artikolo estis en Aŭtorgasto-kolumno de Turun Sanomat 11.7.2009.

En loka gazeto, eble la gazeto estas Sisä-Savo, aperanta en Vesanto, Suonenjoki, Karttula, Rautalampi kaj Tervo estis artikolo pri vesperkoncerto, en kiu du kantistoj kantis en esperanto.

En Kaarina-lehti oni skribis pri Universala Kongreso en Bjalistoko, en kiu partoprenis tridek finnoj kaj ankaŭ Jorma Ahomäki, kiu interesiĝis pri esperanto jam 50 jarojn. Li estis rektoro de lernejo de Piispanristi en Kaarina. Kongreso okazis nun en Bjalistoko en Pollando, ĉar tiu loko estas la naskiĝurbo de Zamenhof kaj li naskiĝis antaŭ 150 jaroj tie. En la kongreso ne oni bezonis interpretistojn.

▷ *ĉi tie mi ne tranoktu*

*oni reenveturos  
tie ĉio estas bone  
sekuraj rutinoj kaj bona flego  
oni povas esti trankvila  
probable sufiĉas, ke nur unu el ni  
sentas sopiron*

*Trad. B.L.*

En Bjalistoko estas Zamenhof-muzeo kaj Esperantocentro. La kongresejo estis Teknika Universitato de urbo. Ahomäki vizitis jam dektri fojoj Pollandon dum kvardek jaroj, sekve li konas la landon bone.

En fino de aŭgusto Jorma Ahomäki vizitas lia maljuna amiko, hungaro István Mórocz, el Svisio. Li estas instruisto de esperanto kaj ili interkonatiĝis en Bruselo antaŭ preskaŭ kvindek jaroj.

– Antaŭe konekto estis tre malfacile havi, sed nun ni parolas per Skype preskaŭ ĉiutage. Mórocz restadas en Finnlando monaton. Li renkontas siajn eksajn esperantolernantojn en Kaarina kaj en Somero.

En Aŭtorgasto-kolumno Jorma Ahomäki skribas pri Jarlibro de UEA, per kiu oni povas facile kontakti aliajn esperantistojn en diversaj landoj. Li trovis unu esperantiston, Virve Ernits, en Kuressaare per la Jarlibro. Ili renkontiĝis en junio.

Jorma mencias du estonajn librojn, kiujn oni tradukis en esperanton. Ili estas ”Lamav tiiger” (nomo en estona lingvo) kaj ”Elukiri 1952–58”, kion skribis Elo Tuglas.

En la hejmo de Virve Ernits ili parolis multe kaj pri multaj aferoj de la mondo. La tempo fluis kiel per flugiloj.

Kiam Jorma Ahomäki estis instruisto de esperanto en jaro 1959 en sia lernejo, li uzis pupdomon en lia instruado. En tiu tempo ne estis multe da instruiloj por esperanto. En Rauvola-lernejo oni instruis esperanton per esceptopermeso dum ses jaroj.

– La angla lingvo estis malfacila, sed esperanto estis facila, diris Pirkko Ilo, unu lernantino de esperanto. Tiun lingvon oni studis konkrete.

Pirkko Ilo kaj ŝiaj kvin klasamikoj rememoris sian lernejon de Rauvola. Ankaŭ István Mórocz estis tie. Li diras, ke esperanto estas pontolingvo

vo inter aliaj lingvoj kaj oni lernis tiujn pli bone, se oni scias esperanton. Ilo kaj ŝiaj amikoj komprenis plu la lingvon.

Esperanto forigis dum kvindek jaroj murojn inter la naciecoj. Hannele Suominen havis leterojn en esperanto, kiujn ŝi ricevis el Estonio kaj el Danio.

Laŭ Turun Sanomat oni povas paroli esperanton kun 230 vortoj kaj Leo Tolstoj adoptis la gramatikon de esperanto en du horoj.

En la foto de artikolo estas Mórocz kaj tri aliaj esperantistoj en klasoĉambro kaj en alia foto estas lernolibroj, kiujn li faris mem antaŭ kvindek jaroj.

Evidente en Sisä-Savo gazeto oni rakontis pri vesperkoncerto en preĝejo de Vesanto. En tiu koncerto oni kantis en esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. La kantistoj estis Marjaana Hukka kaj Maija Röntynen-Huttunen. Esa Toivola ludis orgenon. Li ankaŭ parolas esperanton. Esperantaj kantoj estis "Rigardu belmatenon" de Mika Piiparinen, "La vera paco" de A. Fiorentini kaj "Floras la tero".

Kimmo Hakala estis la organizanto de la evento kaj li diris, ke oni aspiras fari tion ĉiujare.

### **Aŭtunaj tagoj en Pori kaj vizito de István Mórocz**

Satakunnan Työ -gazeto skribis pri Aŭtunaj tagoj de EAF. La gazeto aperis 24.9.2009. Hungaro István Mórocz vizitis en Somero, en Kaarina kaj ankaŭ en Pori. Pri lia vizito en Somero rakontis Somero-lehti 8.9.2009, pri vizito en Pori Satakunnan Kansa 19.9. kaj pri lia vizito en Kaarina rakontis Kaarina-lehti 16.9.2009.

Satakunnan Työ intervjuis Tuomo Grundström, la prezidanton de EAF, en artikolo, kies rubriko estis "Esperantistoj volas egalrajtan mondon".

Ĉifoje estis multaj eksterlandanoj en la Tagoj.

Paula Niinikorpi, kiu loĝas en Pori, rakontis,

ke la Aŭtunaj Tagoj estas kulturemfaza kun prelegoj kaj alia programo. Paula respondis pri aranĝoj de tagoj.

Tuomo Grundström diris, ke ni proponas neŭtralan kaj universalan lingvon.

"Nun en la mondo ne estas egaleco pri lingvoj."

Laŭ Tuomo oficialaj potencogrupetoj ne aprobis esperanton, ĉar ĝi estas ideo por demokratio. Nia asocio forlasis starpunkton al ĉiuj novaj finnaj reprezentantoj en Eŭropa Parlamento pri lingvoj en Eŭropa Unio.

En Finnlando estas tri homoj, kies unu gepatra lingvo estas esperanto.

En alia malgranda artikolo oni intervjuis vicprezidanton de Esperanto-Asocio de Rusio, Valentin Seguru. Li prezentis la inviton partopreni en konferenco de Rusia Asocio en venonta majoj. Tiu okazos en Sankt-Peterburgo kaj estas la centjara jubileo de la asocio. Antaŭ cent jaroj en la unua kunsido partoprenis ankaŭ Ludwik Zamenhof.

Valentin diris, ke antaŭ nelonge li partoprenis en kongreso, kie oni parolis nur la anglan lingvon. Li ne ŝatis la situacion.

En la artikolo estis foto, kie estis Tuomo Grundström, Paula Niinikorpi kaj Valentin Seguru.

### **István Mórocz, esperantoinstruisto**

Somero-lehti kaj Kaarina-lehti skribis pri István Mórocz, kiu revenis al Somero kaj Kaarina post kvindek jaroj. Li instruis tie esperanton 1960–61. Nun li renkontis siajn lernantojn post jaroj. Ili diris, ke en instruado oni parolis multe kaj tiu estis konkreta. La lernantoj rakontis, ke estis pli facile lerni aliajn lingvojn post la lernado de esperanto. En Kaarina oni lernis la lingvon 1959–65 kaj en Somero almenaŭ 1958–63.

Mórocz venis al Finnlando el Svisio, kiam Joel Vilkki invitis lin. Filo de Joel, Juhani Vilkki, renkontis István en Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo 1960 kaj parolis pri li kaj ▷



### **István Mórocz dum la Aŭtunaj Tagoj.**

(Foto: Robert Bogenschneider)

Marjo Laine. En la tria foto estas ankaŭ fruaj lernantoj, Anja Anto kaj Lilja Pessi.

### **Vivo de István Mórocz**

Satakunnan Kansa skribis pri la vivo de István Mórocz kaj kiel li lernis esperanton. Post la dua mondmilito li aŭskultis radion kaj tie trovis programon en esperanto. Patro de István diris la nomon de lingvo al István. Li trovis kun lia amiko du Kongresajn Librojn (de Malmö kaj Bern) kaj en tiuj estis du hungaraj nomoj. István volis renkonti ilin kaj serĉis ilin. Li komencis lerni esperanton sub gvido de la fama poeto Julio Baghy.

Post la popola ribelo en Hungario 1956 István Mórocz fuĝis al Svisio kaj en Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo 1960 li instruis esperanton al finnoj el Somero. Poste li venis al Somero.

Oni skribis pri tio en internaciaj gazetoj kaj István ricevis eldonadokontrakton en Kanado. Li faris lernolibrojn pri esperanto kaj estas vera esperantisto.

En la foto de gazeto estas vizaĝofoto de István Mórocz. Kun la ĝenerala teksto en la gazeto estis informoj pri la Aŭtunaj Tagoj de EAF, dato kaj plukoj el programo.

*Jukka Noponen*



En Turun Sanomat 10.10, en la Tago de Aleksis Kivi kaj la finna literaturo, la Aŭtora gasto Jorma Ahomäki rakontas pri la esperanta traduko de Sep Fratoj, la granda kulturago de Ilmari Ekström el Turku.

La semajna gazeto kun pli ol centmil legantoj de la Instruista sindikato de Finnlando, OAJ, aperigis 9.10. en sia numero 41/2009, p. 42–43, ampleksan kaj simpatian intervjuon kun Tuomo Grundström. Ĝi troviĝas ĉe adreso [www.opettaja.fi](http://www.opettaja.fi) en la reto.

lia maniero instrui esperanton al Joel Vilkki. Mórocz venis al Finnlando per skotero tra la tuta Eŭropo.

Unue lernantoj lernis esperanton tiel, ke ili tute ne uzis la finnan. Poste ili havis lernohorojn de geografio aŭ desegno en esperanto. Laŭ la eksperimento de esperantoinstruo lernantoj, kiuj lernis esperanton, lernis aliajn lingvojn pli bone.

István Mórocz revenis al Svisio kaj establis familion tie. Li havis kvar infanojn.

En Kaarina István instruis esperanton kun Jorma Ahomäki. Ili ne havis lernolibrojn, sed ili uzis multe verdan tabulon kaj ĉiujn aĵojn de klasoĉambro en instruado.

Nun Ahomäki kaj Mórocz renkontis en Kaarina en lernejo de Piispanlähde.

En foto de Kaarina-lehti estas István antaŭ la verda tabulo antaŭ la klaso kaj tri lernantoj ĉirkaŭ la tablo: Pirkko Ilo, Hannele Suominen kaj Pekka Raudeskoski.

En Somero-lehti estas tri fotoj. En la unua estas István Mórocz apud la pentranta portreto de Joel Vilkki. La dua foto estas sur la korto de lernejo; tie István estas kun rektoro Jari Timonen, kaj kun du fruaj lernantoj Satu Vuosio kaj

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

## Muutokset ja lisäykset osoitteistoon:

**Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p@esperanto.fi](mailto:jukka.p@esperanto.fi) (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☎ [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 ☎ [www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kallioaamankatu 10, 15150 Lahti. ☎ [martti.pennanen@phnet.fi](mailto:martti.pennanen@phnet.fi)
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Olli Pajula), Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ <http://esperantooulu.info/> [olli.pajula@gmail.com](mailto:olli.pajula@gmail.com)
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ☎ [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi))
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimi-to. ☎ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☎ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta. Aktiivisia harrastajia on mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro

# 2009

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	10.11.	15.11.	5.12.
1/10	10.1.	15.1.	5.2.
2/10	10.3.	15.3.	5.4.

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:      Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 e      1/1 sivu/paĝo 50 e

1/2 sivua/paĝo 60 e      1/2 sivua/paĝo 30 e

1/4 sivua/paĝo 40 e      1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la

oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



---

## Al memoro de Sirkka Lehtivaara

Inter vidhandikapitoj konata kantistino Sirkka Lehtivaara forpasis la 10-an de julio dum la pasintsoomeraj mildaj momentoj. Sirkka Lehtivaara, naskite Kiander, naskiĝis en 1917. Ŝi frekventis blindullernejon en Helsinki. Post lernejoj jaroj la vivon de Sirkka plenigis ŝia amo al muziko. Precipe kantado estis ŝia dumviva ŝatokupo. Sirkka kantis en korusoj kiel solkantistino kaj eĉ havis proprajn koncertojn.

En la ombro de milito Sirkka trovis amon de ŝia vivo. Oskari Lehtivaara estis aktivulo en la porblindula movado kaj estro de brajla presejo. La komuna ŝatokupo de Sirkka, Oskari kaj iliaj tri infanoj estis esperanto kaj al tio ligitaj internaciaj renkontiĝoj. Pluraj homoj memoras Sirkka kiel kantistinon hejme kaj eksterlande. Ŝia edzo estis sekretario de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj 1950–1962 kaj honora membro de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj Universala Esperanto-Asocio.

Mi konatiĝis kun Sirkka kiam la organiza movado de vidhandikapitaj virinoj komenciĝis. Sirkka instruis pli junajn virinojn akiri lertecojn vivi kiel vidhandikapito. Ŝi mem inventis plurajn rimedojn por faciligi vartadon de bebo. Unu el tiuj estis banbarilo. Sur bankubon de bebo oni metis trogon faritan de ŝtofo kaj sledglitilo. En trogon eblis sekure meti bebon tiel, ke lia kapo kuŝis en la pli alta parto de banbarilo. Dank' al tiu trogo ambaŭ manoj de patrino restis liberaj por bani bebon.

Dum lastaj jaroj serioza malsano kaŭzis, ke Sirkka ne povis partopreni la asocian kaj societan vivon, sed ni, kiuj konis ŝin antaŭe, memoras ŝin kiel diskretan, gajan, civilizitan kunvojaĝantinon kaj subtenantinon flanke de ni.

Bonodorajn florojn sur via tombo Sirkka

*Eeva Korkala*

*(esperantigis Ritva Sabelli)*

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 15.11.2009 mennessä päätoimittajalle. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2009 al la ĉefredaktoro. Osoite/adreso: Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku, puh/tel. (02) 2373 848, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

**Kopio Niini, Tampere 2009**